

Esperanto *en Danio*

15-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto 2008



Danaj partoprenantoj en Roterdamo

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder
Vestavej 4, 2770 Kastrup
☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk
Ĝirokonto: 805 7370
UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Ejnar Hjorth (vicprezidanto)
Bent Jensenius
Rasmus Høyrup Jensen
Ole Terkelsen

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen
c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
☎ 24 47 50 40 eed@esperanto.dk

Presado: Atlas-Quick

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas
permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.11.2008

Enhavo

Aŭtunaj eventoj.....3

Monde

Impresoj pri la 93-a UK.....4

La solena inaŭguro.....6

Mallonge pri la 93-a UK.....7

Mesaĝo de Unesko.....8

95-a UK en Kubo.....10

Nobel-kandidatigo de UEA.....11

Esperanta televido.....11

Ĵurnalistoj en Vilnius.....12

Lee Chong-Yeong forpasis.....13

Rekorda lingvofestivalo.....15

Seminario pri Vikipedio16

Lande

Agado per blogado.....17

Lis Thune 1923-2008.....19

Gazeteltondaĵoj.....21

Danaj Esperantaj retpaĝoj.....23

Ekspozicio.....24

Loke

Næstved.....25

Kopenhago.....26

Aŭtunaj eventoj



Apenaŭ finiĝis la solena UK en Roterdamo, kaj jen denove ampleksa agado atendas nin. Mi volas atentigi vin pri kelkaj gravaj aranĝoj:

Tago de integriĝo: La 30-an de aŭgusto KEK partoprenos por la tria fojo kun budo dum la Kopenhaga Tago de Integriĝo, kiu okazos ĉe

Dronning Louises Bro de la 12 ĝis la 18 horo. Dum tiu tago ni havos la okazon varbi interesitojn al la venontaj aranĝoj.

Eŭropa Socia Forumo okazos de la 17-a ĝis la 21-a de septembro en Malmö. DEA, SEF kaj EEU aranĝas seminarion kaj budon. La prezidanto de EEU Séan O’Riain prelegos sabate la 20an de septembro je la 9.30 pri la temo: Egalrajta interkultura dialogo en tutmondiĝanta mondo, kaj Lars Forsmann enkondukos la bazajn principojn de nia lingvo. Kiam ni ekscios pri la loko de la seminario, ni informos pri ĝi en nia hejmpaĝo www.esperanto.dk.

Lingva festivalo okazos la 21-an de septembro de la 11-a ĝis la 19-a horo en la Kulturdomo, Dortheavej 61 en kunlaboro kun pluraj organizoj; vidu la afiŝon en la lasta paĝo de la revuo, kaj la hejmpaĝon: www.sprogfestival.dk.

Partoprenu kaj apogu niajn aranĝojn !

Ileana Schrøder

Impresoj pri la 93-a UK

Ans Bakker ĉarme diris, ke la roterdamaj nuboj ploretis pro ĝojo, ke Roterdamo bonvenigis 1.800 partoprenantojn al la 93-a Universala Kongreso, kiu okazis de la 19-a ĝis la 26-a de julio. Ĝoje aŭ malĝoje, ne gravis la vetero, ĉar la celo de nia ĉeesto estis la plenprofito de la ampleksa programo - proksimume 190 agadoj dum 6 tagoj.

Du el la plej gravaj kongresaj aferoj estis la kongresa temo kaj la finfina kongresa rezolucio. Por UEA centjariĝa kongreso okazanta dum la UN Internacia Jaro de la Lingvoj tre taŭgis la temo elektita : 'Lingvoj: trezoro de la homaro'. Ankaŭ tre rilata estis la finfina kongresa rezolucio:

“La kongresa rezolucio de la ĉi-jara Universala Kongreso instigas ĉiujn agnoski la esencan valoron de lingva diverseco kaj proponas al la monda komunumo science esplori la rolon de Esperanto en pli efika kaj justa komunikado.”

Alia tre grava temo en la kongreso estis la oficiala agnosko de la valoro de informteknologio por la disvastiĝo de nia lingvo. Dum la solena malfermo de la kongreso la festpreleganto Humprey Tomkin parolis pri Esperanto kiel avangarda lingvo dum periodo en kiu naskiĝis la ebleco de populara vojaĝo. Nun alvenas nova. informa teknologio per kiu la homaro ekpovas interkomunikiĝi kaj lerni Esperanton. En 1908 por lerni Esperanton oni membriĝis iu klubo, nuntempe oni lernas la lingvon pere de la reto, ne informiĝante pri UEA. La defio por UEA do estas la kaptado de retaj samideanoj. Jen retligilo al la prelego de Humphrey Tonkin.

<http://www.ipernity.com/doc/kallekn/2478645/in/album/75828?lg=eo>

Dum la kongreso oni havis la ŝancon aŭskulti prelegojn pri pluraj teknologiaj lerniloj kaj informiloj: ekzemple Dua Vivo, Edukado.net kaj Vikipedio. Mi mem nur aŭskultis la prelegon pri Dua Vivo. Anna Löwenstein, Bent Holm kaj Beatrice Allée lerte instruis nin pri ties uzado kaj utileco. En tiu virtuala mondo troviĝas Esperanto-klubo, babilejo, dancejo kaj lernejo. La membraro nombras 400, og tie eblas aŭskulti prelegojn pri diversaj temoj. La unua malavantaĝo laŭ mi estas, ke oni devas konstrui kaj movigi sian avataron (kiu estas ia virtuala pupeto!). Finfine kvazaŭ akcepto de la teknologia defio UEA agnoskis la valoron de Edukado.net kaj Lernu.net per premioj por elstara agado por Esperanto.

En la kleriga lundo mi aŭskultis la prelegon de Dennis Keefe pri ‘Kiel organizi Lingvajn Festivalojn’. Interese estis aŭdi pri la organizado de sukcesplenaj festivaloj, en kiuj oni mallonge ‘gustumas’ la lingvojn kaj en kiuj ne okazas aliaj distraĵoj. Verdire laŭ lia koncepto la kopenhaga lingvo-festivalo estas lingvo-foiro. Tamen ni rajtas nomi nian festivalon laŭ propra gusto, ĉu ne?

La arta, distra kaj prelega programo estis tre gaja kaj profesia. La nacia vespero, la koncerto de Jomart, Nataŝa kaj Karina, JoMo kaj la internacia vespero sukcesis allogi grandan parton de la kongresanaro. Spite al la problemoj pro la manko de seĝoj kaj la rigoreco de la fajroestingistoj mi havas la impreson, ke oni pardonemis pro la entuziasmo pri la distraĵoj. Plej plaĉis al mi la koncerto de Jomart, Nataŝa kaj Karina, kaj dum la internacia vespero la inspira deklamado de la zamenhofa poemo ‘La Vojo’ de virino de Kubo.

Ŝajnas al mi ke, la Universala Kongreso estas la plej granda kaj vigla babilejo en la tuta Esperantujo! Eĉ post nur 3½ jaroj kiel esperantisto mi miris pri la amaso da salutoj, brakumoj, kisetoj, promesetoj, kiujn mi ricevis kaj reciprokis dum la kongreso. Eĉ se estis agrable, verdire tiuj ĉi kontaktoj estis mallongaj kaj supraĵaj. Tamen tio estas neevitebla, se oni volas partopreni almenaŭ duonon de la 190 aktivaĵoj.

Tro rapide flugas la tempo, kiun oni ĝuas. Sabate post la solena fermo de la kongreso mi revenis hejmen. Tiutage someris kaj la nuboj estis forveturintaj. Se iu ploretus, estis pro la ĝojo ekvidi la sufiĉe grandan grupon da infanaj esperantistoj, kiu finfine kuris en la kongresejon – jen la espero de nia lingvo kaj movado.

Ĝis revido en Bjalistoko la venontan jaron!

Betty Chatterjee

La solena inaŭguro

La kongresa inaŭguro estis kiel ĉiam tre solena, sed ĉi-foje eĉ pli pro la centjariĝo de UEA. Ĝin ĉeestis interalie diplomatoj de pluraj landoj, ĝin salutis la reĝa familio, sekvis la varma mesaĝo de la ĝenerala direktoro de Unesko kaj la kortuŝa salutparolado de Louis Christophe Zaleski-Zamenhof. Resuminte la pasintajn cent jarojn de UEA kaj la nomojn de la plej elstaraj pasintaj kaj nunaj esperantistoj, li daŭrigis per jenaj vortoj:

« La Asocio ne funkcius sen la entuziasmo de ĝiaj membroj; ĝi malfunkcius sen la sindonema laboro en sia Centra Oficejo; laboro de la teamo de bonkvalitaj oficistoj gvidataj de same sindonema Ĝenerala Direktoro. Mi salutu tiurilate Simo Milojevic, ĵus emeritiĝantan, kaj Osmo Buller, la aktualan mastron, ambaŭ amikoj miaj. Krome ni ne forgesu la meritojn de Stano Marček, la brila redaktoro de nia ĉiumonata ligilo, la revuo *Esperanto*. Fine, ni ĉiuj forte esperas, ke nia Estraro, sub la prezido de Probal Dasgupta, efike daŭrigos la vojon de siaj indaj antaŭuloj, gvidonte la movadon al novaj, rimarkeblaj sukcesoj.

Okazas, ke ni vivas nuntempe en la periodo de sinsekvaj jubileoj. Ĉi-jare ni festas centjariĝon de la Asocio, lastjare okazis centdudekjara datreveno de la Unua Libro, venontjare ni honorigos en Bjalistoko la centkvindekan datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, avo ne nur mia, sed avo de ĉiuj esperantistoj! Mi tamen

ne estas certa, kioma datreveno okazos rilate al detruo de la Babel-turo. Fakte precizaj datoj mankas tiurilate en la Malnova Testamento. Ni povas nur lerni, legante la ĉapitron de kunuan, ke Dio, por puni la homojn pro ilia sincerteco, konfuzis ilian lingvon, per multego da idiomoj ĝin anstataŭigante.

Ĉu fakte la Dia intenco estis puni la homaron? Ĉu la novaj lingvoj ne estis kreitaj kiel puno sed kiel donaco? Ĝuste hodiaŭ kaj dum la venonta semajno, ni debatos ĉi tie pri lingvoj ne kiel pri puno, sed kiel pri trezoro de la homaro! Ĉar sen la lingva diverseco, la multnombro de kulturoj ne povus ekzisti, tiu diverseco estanta riĉeco senkompara de la homaro. La lingva diverseco povas tamen esti danĝera: ĝi kaŭzas malkomprenon inter homoj unuopaj, sed ankaŭ inter popoloj diverslingvaj. Kaj ofte malkompreno kondukas al malamo, kaj malamo inter popoloj povas konduki eĉ al militoj.

Tial, por alporti ‘sanktan haronion al la mond’ eterne militanta’, ni esperantistoj proponas la ‘neŭtralan lingvan fundamenton’, sur kiu ‘la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian’. Ni insistas, ke tiu lingvo neŭtrala ne celas malaperon de lingvoj naciaj. Tute kontraŭe: ĝi helpas ilian longdaŭrecon, eĉ al lingvoj parolataj de tre malmultnombraj gentoj. Esperanto, lingvo neŭtrala, ne anstataŭas lingvojn naciajn; ĝi devas esti la dua lingvo por ĉiuj. Malsame, iu ajn lingvo nacia, trudante sin kiel internacian, tendencas substituiĝi al aliaj lingvoj naciaj, minacante tiamaniere la daŭrigon de ilia ekzisto. Tiu minaco rilatas sekve al la kulturoj pere de tiuj lingvoj reprezentataj, kreante danĝeron al trezoro de la homaro. Ni, esperantistoj, ni tiun trezoron defendu, respektante la bonfaron de la Babela detruo! »

Mallonge pri la 93-a UK

Vizito al la Centra Oficejo. Dum prenis la okazon viziti ĝin, kie la kongreso oni povis viziti la Osmo Buller bonvenigis nin. Tiu sidejon de Centra oficejo, kaj mi vizito estis aparte interesa por mi,

kiu tre ofte rilatas kun la Centra Oficejo. Post la renoviĝo ĝi aspektas tre luma kaj moderna, loko kie oni povas tuj senti sin en agrabla etoso.

Eŭropa Esperanto Unio havis ankaŭ sian jarkunvenon dum la kongreso kie la estraro raportis pri la agado en 2007 kaj ĉijaraj atingoj kaj planoj. La estraro deziris daŭrigi sian laboron dum la venontaj jaroj kaj la deziro estis aprobata kaj la estraro reelektita. Precipe rimarkinda estas la aprobo de la Eŭropa Komisiono al EEU pri subvencio por oficejo kaj oficisto en Bruselo, kaj la venonta

partopreno de Séan O’Riain al la Eŭropa Socia Forumo la 20-a de septembro en Malmø. Venontjare la EEU-kongreso okazos en Herzberg, la Esperanta Urbo!

Dum la kunveno de **TEĴA** oni aprobis la novan statuton, kio faciligos la laboron de la nova Ĵurnalista Asocio, kiu volas ankaŭ aliĝi al la internacia federacio de ĵurnalistoj.

Finfine la vicprezidanto de Bjalistoko ricevis la flagon kaj bonvenigis nin al la urbo kiu jam delonge komencis labori por la jubilea kongreso 2009!

Ileana Schrøder

Mesaĝo de Unesko

Al la 93-a Universala Kongreso de Esperanto en Roterdamo

Ĉi tiu kongreso okazas je tute taŭga momento: duone tra la Internacia Jaro de Lingvoj 2008. Kiel esenca dimensio de homa ekzistado, lingvoj ĉiam estis en la kerno de la misio de Unesko, kaj ni ludas gvidan rolon en la kunordigado de agadoj tra la jaro. Fakte, lingvoj estas menciitaj en la unua artikolo de nia Konstitucio, kiu diras ke la celo de la organizo estas “kontribui al paco kaj sekureco, stimulante kunlaboradon inter la nacioj per edukado, scienco kaj kulturo por antaŭenigi universalan respekton por justeco, por la regado de leĝoj kaj por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj (...) sendistinge pri raso, sekso, lingvo aŭ religio.”

Ĉi tiu vizio daŭre gvidas la laboron de la organizo, kaj je la labora kaj je la normiga niveloj, en ĉiuj niaj kampoj de kompetento: edukado, sciencoj, kulturo kaj komunikado. Ni laboras por antaŭenigi plurlingvan edukadon kaj multlingvismon en ciberspaco, por savi endanĝerigitajn lingvojn, plifortigi indiĝenajn lingvojn kiel portilojn de scienca scio kaj scipovo, kaj por analizi la ligojn inter la praktikado de lingvoj kaj sociaj transformiĝoj. Nian agadon en la kampo de lingvoj antaŭnelonge plifortigis la kreado de Intersektora Platformo por Lingvoj kaj Multlingvismo.

Plie, Unesko laŭ sia propra naturo estas multlingva organizo: niaj gvidaj organoj laboras per naŭ lingvoj, kaj multaj paĝoj kaj temoj en nia Unesko-retejo estas seslingvaj.

Estante centra por la identeco de individuoj kaj reprezentante strategian faktoron por daŭrigebla evoluo, multlingvismo estas nuntempe, en epoko de tutmondiĝo, pli ol iam ajn ŝlosila temo por la estonteco de la homaro. Tial la slogano, kiun ni kreis por la Internacia Jaro de Lingvoj esprimas klare sed elokvente, ke “lingvoj gravas”.

Kongrue kun la senĉesaj klopodoj faritaj de ĉiuj esperantistoj en la mondo tra la lastaj jardekoj, la 93-a Universala Kongreso de Esperanto reprezentas unikan kontribuon al la afero de lingva diverseco. Tial mi deziras al Universala Esperanto-Asocio, al la organizantoj de la kongreso kaj al ĉiuj partoprenantoj plenan sukceson en iliaj diskutadoj. Plie, Unesko laŭ sia propra naturo estas multlingva organizo: niaj gvidaj organoj laboras per naŭ lingvoj, kaj multaj paĝoj kaj temoj en nia Unesko-retejo estas seslingvaj.

Estante centra por la identeco de individuoj kaj reprezentante strategian faktoron por daŭrigebla evoluo, multlingvismo estas nuntempe, en epoko de tutmondiĝo, pli ol iam ajn ŝlosila temo por la estonteco de la homaro. Tial la slogano, kiun ni kreis por la Internacia Jaro de Lingvoj esprimas klare sed elokvente, ke “lingvoj gravas”.

Kongrue kun la senĉesaj klopodoj faritaj de ĉiuj esperantistoj en la

mondo tra la lastaj jardekoj, la 93-a Universala Kongreso de Esperanto reprezentas unikan kontribuon al la afero de lingva diverseco. Tial mi deziras al Universala Esperanto-Asocio, al la organizantoj de la kongreso kaj al ĉiuj partoprenantoj plenan sukceson en iliaj diskutadoj.

Koïchiro Matsuura

Ĝenerala Direktoro de Unesko

[gaz kom 297 de UEA]

95-a UK en Kubo

La estraro de UEA decidis okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto en 2010 en Havano en Kubo. Tion anoncis la ĝenerala sekretario de UEA, Barbara Pietrzak, en la solena fermo de la Roterdama UK.

Osmo Buller, la ĝenerala direktoro de UEA, jam en februaro vizitis Havanon laŭ invito de Kubana Esperanto-Asocio. La celo de lia vizito estis esplori la kondiĉojn por okazigi la UK en Havano en la jaro 2010. Kun subteno de ŝtataj, urbaj kaj turismaj aŭtoritatoj KEA nun venigas la esperantistan mondrenkontiĝon al Kubo jam por la dua fojo. Unuafoje la UK okazis en la kuba ĉefurbo en julio 1990.

En majo la ĝenerala direktoro vizitis Moskvon, kiu same invitis

la Kongreson por la jaro 2010, ĉar la pli frua invito por la jaro 2009 ne estis sukcesa. Ankaŭ en Moskvo la lokaj aŭtoritatoj promesis subtenon por la kongreso, sed la estraro de UEA fine preferis la proponon de la kubaj esperantistoj.

La elekto de Kubo jam de kelka tempo aspektis klare pli verŝajna ol ke Moskvo ricevu la kongreson en 2010. Kiel argumentojn malfavorajn al Moskvo oni ofte menciis la altajn prezojn en la hoteloj de Moskvo kaj la komplikecon de la vizaj proceduroj. La subtenantoj de Moskva UK atentigis, ke dum la pli ol 120-jara historio de Esperanto ĝis nun neniam okazis UK en Rusio, dum multaj jaroj unu el la plej gravaj landoj de la movado.

[Libera Folio]

Nobel-kandidatigo de UEA

La pola parlamento (alinome Sejmo) ĵaŭde la 12-an de junio unuanime per 397 voĉoj aprobis rezolucion, kiu omaĝas la cent-jariĝon de Universala Esperanto-Asocio kaj donas sian subtenon al la kandidateco de UEA por la Nobel-premio pri paco.

Laŭ la parlamento, temas pri omaĝo al la daŭrigantoj de la verko de Ludoviko Zamenhof, kiu “kreante la lingvon Esperanto deziris certigi al ĉiuj homoj la eblecon de reciproka kompreno kaj interkompreniĝo sendepende de la nacieco, raso, religio kaj propraj mondkonceptoj”.

La rezolucio ankaŭ konstatas, ke “Esperanto ligas homojn en

riĉa kaj valora kulturo, kies fundamenta mesaĝo estas internacia amikeco kaj universala paco”. Tial la pola parlamento opinias, ke UEA ricevu Nobelan pac-premion:

“La sejmo, dezirante omaĝi la kontribuon de d-ro Ludoviko Zamenhof al la monda civilizacia heredaĵo subtenas la klopodojn de internaciaj medioj, ke UEA estu honorita per la paca Nobel-premio”.

- Tio signifas ke Esperanto reakiris honorindan pozicion en sia naskiĝlando post la ŝanceliĝoj antaŭ kelkaj jaroj, gratule komentis eksprezidanto de UEA Renato Corsetti.

[Libera Folio]

Esperanta televido

La 2-an de majo en 2008 ĉe la retejo <http://www.itvc.pl> startis nova projekto: “TV – Esperanto”. Ĝia celo estas transdoni gravajn informojn por esperantistoj ne nur el Bjalistoko, la naskiĝurbo de la iniciatinto de la internacia lingvo, sed ankaŭ el aliaj partoj de la mondo, kie delonge la ideo de Esperanto estas konata. Ĝi elsendos programojn pri esperantistoj, iliaj sukcesoj, kluba agado, kongresoj, renkontoj ktp. Oni prezentos la plej interesajn libroeldonaĵojn, Esperanto-teatrojn, muzik-ensemblojn, filmojn kaj vizitindajn lokojn. La realigantoj esperas, ke la

projekto iĝos diskuto-forumo por esperantistoj el la tuta mondo.

Kadre de la elsendoj de “Televido - Esperanto” oni lanĉis konkurson. La konkursajn demandojn vi povos aŭdi en kado de la elsendata programo. Respondojn bonvolu sendi al la redakcia adreso: esperanto@itvc.pl. Vi povas lasi personan komenton ankaŭ en la retpaĝo de “Televido-Esperanto” sub la televida fenestreto.

Ĵurnalistoj en Vilnius

Kun la prezidantinoj de DEA kaj de KEK mi partoprenis la unuan Tutmondan Kongreson de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en la litova ĉefurbo Vilnius inter la 25-a kaj



Parolas ĉe akcepto la prezidanto de la litova parlamento Česlovas Juršėnas. Apude staras Povilas Jegorovas, fone Audrys Antanaitis.

31-a de majo. Ĝi havis tre streĉan laborprogramon. Okazis ne malpli ol 53 prelegoj pri temoj kiel la litovaj amaskomunikiloj, ĵurnalisma etiko, la interreto kiel minaco kaj ŝanco por la Esperantogazetaro, cenzuro kaj konformismo, esperanto-ĵurnalistoj kiel interkulturaj perantoj, kaj multe pli. Estis reaktivigita la “Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio” (TEĴA) kaj oni tuj komencis diskuti kiel TEĴA rilatu al la Internacia Federacio de Ĵurnalistoj.

La kongreso havis iom malpli ol 200 partoprenantojn, sed la kongresa teko facile kompariĝis kun la dokumentaro kiun oni ricevas en UK. La kongresa libro enhavis ne nur programon, liston de la kongresanoj kaj resumojn de la prelegoj, sed ankaŭ treege

utilan superrigardon de la historio de la Esperantogazetaro kaj oficialajn salutojn de la ĉefministro, la prezidanto de la parlamento, la urbestro de Vilnius, la ministro pri eksteraj aferoj kaj la ministro pri kulturo.

Kaj tio ne estis malplenaj vortoj! La partopreno, tranoktado, manĝado kaj por multaj la vojaĝ-kostoj estis pagitaj de la litova ŝtata kaso. Akceptis nin la urbestro, la ĉefministro kaj la prezidanto de la parlamento; la ĉefministron ni ne vidis persone, kompanse ni dufoje vidis la prezidanton de la parlamento. La kunsidoj okazis parte en la malnova urbodomo de Vilnius, parte

en la parlamento – en la ĉambro kie la konstitucio estas ekspoziciata! Pli prestiĝe apenaŭ povas esti; ni eĉ estis la unua eksterlanda grupo kiun oni lasis kunsidi en tiu ĉambro.

Dum la akcepto en la parlamento, la parlamenta prezidanto transdonis oficialan gratulleteron al la novelektita prezidanto de TEĴA Audrys Antanaitis, radia ĵurnalisto konata pro siaj matenaj babilprogramoj kun politikistoj, kaj cetere vicprezidanto de la litova ĵurnalista asocio. La tuta afero ne povus okazi sen Povilas Jegorovas, prezidanto de la Litova Esperanto-Asocio kaj viro kun multaj talentoj kaj kontaktoj.

Jens S. Larsen

Lee Chong-Yeong forpasis

Prof. d-ro Lee Chong-Yeong, eksa prezidanto de UEA, forpasis post elĉerpa malsano la 4-an de julio en la aĝo de 76 jaroj. Lee naskiĝis la 13-an de februaro 1932. Li studis ĉe la universitatoj Yeungnam (Koreio), Hawaii kaj Harvard (Usono) kaj doktoriĝis pri komerca ekonomiko en la Universitato de Kobe (Japanio). Dum sia profesia kariero li estis ĉefo de la merkatumo grupo de la UN-organizo pri Nutraĵo kaj Agrikulturo, kaj profesoro de la Kyungpook Ŝtata Universitato (Korea Respubliko). Li estis ĉefkonsilanto de la Korea Industria kaj Evoluiga Instituto, gastprofesoro de la Universitato de

Kobe, honora profesoro de la Nankaj-Universitato (Ĉinio) kaj orda profesoro de la Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino.

Lee Chong-Yeong lernis Esperanton aŭtodidakte en 1948. Li estis prezidanto de Korea Esperanto-Asocio (1994-95, 1998-2001), prezidanto de UEA (1995-1998) kaj vicprezidanto de UEA (2001-2004). Kiel prezidanto de UEA li distingiĝis kiel dinamika kaj iniciatema gvidanto, kies plena sindediĉo al Esperanto, sincereco kaj persona ĉarmo faris lin amata de ĉiuj. Li kuniniciatis la unuan Nitobesimpozion en la Universala Kongreso en Prago en 1996 kaj la Manifeston de Prago, kiu, subskribita de pli ol 13 000 esperantistoj, plu restas la gvida dokumento pri la celoj de la Esperanto-movado. En 1996 prezidanto Lee lanĉis Kampanjon 2000, kiu kune kun la Manifesto de Prago katalizis senteban pliaktiviĝon en UEA kaj la cetera movado.

Lee Chong-Yeong verkis “Esperanto en la 21-a jarcento” (2001), “Esperanto, la lingvo de la 21-a jarcento” (en la korea, 2001), “Esperanto kaj internaciaj organizaĵoj” (2003) kaj “80-jara historio de la korea Esperanto-movado” (en la korea, 2003), “Ridante lernu” (2007), kaj “Elektitaj Zamenhofaj proverboj” (2008). Li ankaŭ havis esencan rolon en la estigo de la Esperanta eldono de “Historio por malfermi estontecon” (2007), libro pri la moderna historio de Ĉinio, Japanio kaj Koreio.

En 2004 Lee Chong-Yeong estis elektita honora membro de UEA pro liaj elstaraj meritoj por UEA kaj la tutmonda Esperanto-movado. Li estis ankaŭ honora prezidanto de Korea Esperanto-Asocio. La ĉina ŝtato dekoraciis lin per la Medalo de Entuziasma Subteno de Konstruo kaj Kunlaboro por Ĉina Amikeco, kaj la prezidento de Vjetnamio per la Medalo de Entuziasma Subteno por la Vjetnama Esperanto-Movado.

[UEA gaz kom 289]

Rekorda lingvofestivalo

La unua Lingva Festivalo en Ĉinio okazis la 10-an kaj 11-an de majo ĉi-jare ĉe la prestiĝa Universitato de Nanjing. Ĉeestis ĝin pli ol 13 500 homoj, kaj post la angla Esperanto estis la plej populara el la 70 lingvoj prezentitaj kaj instruitaj ĉe la festivalo. Al la sukceso de la aranĝo grave kontribuis la nuntempa vicestrino de la Fako pri Aplikata Lingvistiko de la Universitato de Nanjing, Cui Jian Hua. Laŭ ŝia propono la universitato nun volas dungi instruistojn, kiuj krom sia gepatra lingvo povas aldone instrui Esperanton.

La unua Lingva Festivalo de Ĉinio restos en la historio de Lingvaj Festivaloj kiel epokfara evento. Pli ol 70 lingvoj kaj dialektoj, pli ol 250 kursetoj, kaj sume 13 547 lernantoj. La ununura lingva festivalo komparebla je nombro de ĉeestantoj estas tiu de Tours (Francio) en la jaro 1997, kie ĉeestis iom pli ol 3 600 gelernantoj, nura kvarono de la ĉina lingva festivalo.

Por vidi ĉi tiun festivalon en perspektivo, eblas kompari la 13 547 ĉeestantojn kun la rezultoj de la unuaj Lingvaj Festivaloj en Francio kaj en Rusio. En la unua lingva festivalo de Tours en 1995 estis 789 ĉeestantoj, dum en tiu de Ĉeboksaro de Rusio en 1996 estis 150.

La lingva festivalo de Nanjing estigis multnombrajn artikolojn kaj raportojn en la ĉinaj amaskomunikiloj. Almenaŭ naŭ ĵurnalaj artikoloj,

radiaj elsendoj, kaj kvin televidaj programoj en kiuj pluraj esperantistoj parolis. En la amaskomunikiloj en Nanjing kaj en la regiono la vorto Esperanto estis favore menciita multfoje. Por eble milionoj da ĉinoj estis la unua fojo aŭdi pri Esperanto.

Laŭ la direktoro de la festivalo, Dennis Keefe, kredeble estas rekordo la nombro de personoj kiuj ĉeestis provlecionojn de la Internacia Lingvo. Antaŭ okdek jaroj, la fama instruisto Andreo Cseh iam atingis ducent kvindek personojn en tago de provlecionoj, sed neniam en la historio de Esperanto oni vidis tiom da novaj spertantoj de nia lingvo. Verŝajne ĉiu el la tri ĉefaj instruantoj de la esperantaj kursoj por plenkreskuloj, Augusto Casquero, Michel Fontaine kaj Peng Zhenming, superis la rekordon de Cseh.

[el Libera Folio]

Seminario pri Vikipedio

Dum la ĉi-jara aranĝo KAEST (t.e. Kolokvo pri Aplikado de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) okazos krom la kutima prelegprogramo ankaŭ **trejnseminario pri Vikipedio**, kun aparta atento al problemoj pri verkado de fakaj artikoloj.

Estos je nia dispono 22 komputiloj kun konstanta retkonekto, do ĉiuj povos tuj ekzerci la nove akiritajn informojn kaj krei proprajn kontribuojn pri sia kompetenta faka temo.

Gravas aldoni, ke por fariĝi vikipedia kontribuanto tute ne necesas esti komputila fakulo, sufiĉas kapabloj de kutima laika uzanto!

La seminarion gvidos Pavla Dvořáková kaj Miroslav Malovec, kun asisto de pliaj vikipediaj spertuloj.

La aranĝo KAEST okazos inter 7-9 de novembro 2008 en urbeto Dobruživice, aŭ Prago, en Ĉeĥio. Pliaj detaloj kaj aliĝ-eblo: <http://www.kava-pech.cz/trip-kaest2008e-esperanto.html>

Ĉar ni ricevis la permeson uzi la komputilan klasĉambbron de la najbara lernejo nur post la presado de aliĝiloj, interesatoj pri partopreno en la seminario estas petataj enskribi tion en libera formo en suba parto de la aliĝilo. La seminario okazos, se aliĝos almenaŭ 6 partoprenantoj, maksimuma nombro estas 22 (pro disponeblaj komputiloj).

La aliĝintoj ricevos anticipe retforme instrukciojn kiel antaŭprepari koncizan tekston, kiun oni lernos strukturigi kaj prilabori en vikipedia formo.

Ne hezitu aliĝi kaj ekpartopreni en unu el la plej fascinaj tutmondaj projektoj de la nuna tempo, plene kongruaj kun la ideo de esperantismo!

Petr Chrdle [Ret-Info]

Lande

Agado per blogado

Kiel aliloke, la gazetaro en Danio malofte aperigas novaĵojn aŭ artikolojn pri Esperanto. Eĉ se oni sendas al iu redakcio informojn pri gravaj esperantaj aŭ lingvaj aferoj, ili estas ignorataj. Ĉu ekzistas gazetara konspirado de persilenta mortigo? Verŝajne ne, tamen kiu povas konkurenci kun skandaloj pri la politikistaj pekoj kaj petrolaj prezoj ktp.? Tial por inciti la intereson de la loĝantaro, kial ne blogi?

Tiel mi rezonis, do la 1-an de majo mi dane ekblogis ĉe la reta versio de la dana gazeto '24 timer' (24 horoj). Tiu gazeto estas unu el la kvar ĉiutage jen rete jen papere senpagaj gazetoj, distribuataj tutlande. 24 timer estas ligita al la serioza gazeto 'Politiken'. Pere de la reta gazeto registritaj legantoj rajtas diskuti novaĵojn, debati pri diversaj temoj kaj blogadi pri io ajn. Nuntempe la registrita legantaro proksimiĝas al 85.000, ŝajnas ke la plejparto konsistas el gejunuloj.

Blogo estas persona taglibro. Principe oni povas skribi ion ajn en sia blogo. Mi elektis skribi pri miksaĵo de ĉiutagaj eventoj, biografiaj rakontetoj pri mi mem kaj pri miaj forpasitaj familianoj kaj geamikoj; tamen pri vivantaj familianoj aŭ geamikoj mi estas tute diskreta. Plue mi malkaŝe informas pri miaj sociaj sintenoj kaj kompreneble pri mia vigla kaj feliĉa Esperanta vivo. Survoje mi jam informiĝas pri Esperanto, la Esperanta kulturo, la historio kaj la nuntempa agado. Mia stilo aŭ fasono estas malstreĉa kaj distra, ĉar ŝajnas ke la legantaro atendas distraĵojn. Iom post iom mi jam ricevis invitojn de aliaj grupoj ĉe 24 timer, interalie la Eŭropa grupo, kie okazis vigla diskutado pri la eventuala rolo de Esperanto en Eŭropo.

Ĉu indas la blogado? Post nur dumonata blogado mi konstatas ke:

1. Inter la 1-a de majo kaj la 2-a de aŭgusto oni 8.000-foje alklakis mian ligilon. Tio ne signifas, ke la klakantoj ĉiam legas la blogon. Meznombro 30 – 35 legas ĉiun kontribuon.
2. Sur la komenco-paĝo de la gazeto estas skribitaj la tiel nomataj etiketoj; t.e. la temvortoj de la kontribuoj. Jam de longe Esperanto jam estas la plej granda vorto sur tiu ĉi paĝo – eĉ multe pli granda ol vortoj tiel kiel ‘infanoj’, ‘somero’ kaj ‘amikoj’.
3. La malgranda grupo da esperantistoj ĉe la gazeto jam kreskas de 6 ĝis 11.
4. La hejmpaĝo de 24 horoj havas kalendaron, kaj en tiu estas informoj pri la lingvo-festivalo kaj la malferma tago de KEK.

Jen modesta rezulto, tamen rezulto.

Dum la internacia ĵurnalista kongreso en Vilno, en kiu mi partoprenis kune kun Jens kaj Ileana, mi parolis kun Gunnar Gällmo de Svedio. Li ankaŭ blogas ĉe sveda gazeto.

<http://metrobloggen.se/jsp/public/index.jsp?article=19.97499>

Post la reveno de Vilno Jens verkis kvin artikolojn pri la kongreso.

http://24.dk/user/jens_s_larsen/perma/2008/06/01/Udflugtsdag

Jen granda laboro – ĉu indas, ĉu endas?

Ĝi estas unu el la rimedoj interesigi la homaron pri Esperanto. Se sufiĉe multaj emas klaki kaj legi la informon, eble la ĵurnalistaro pli atente kaj respekteme legos la oficialajn informilojn, kiujn ni sendos.

Ĝis tiam, karaj gesamideanoj, bonvolu viziti mian blogon, kaj eĉ pli utile estus, se vi mem fariĝus dana bloganto.

Betty Chatterjee



Lis Thune (1923 – 2008)

La 20-an de majo 2008 Lis Thune forpasis. Ŝia infanaĝo ne estis feliĉa. Kiam ŝi estis tute malgranda, ŝia patrino malsaniĝis, kaj la patro ne povis sole prizorgi la kvin infanojn. Pro tio ŝi edukiĝis en infanhejmo, kie ŝi ne sentis sin bone. Poste ŝia onklino "adoptis" ŝin, kaj nur kiel plenkreskulo ŝi trovis siajn gefratojn, kiuj edukiĝis en aliaj hejmoj. En 1941 Lis Thune komencis studi ĉe porinstruista seminario en Odense same kiel mia patro, Peter Zacho, kaj ŝia estonta edzo, Kaj Andersen. Post nelonge miaj gepatroj Kirsten kaj Peter Zacho translokiĝis al Kopenhago. En 1958 ankaŭ Lis translokiĝis al tiu urbo, kie ŝi eklernis Esperanton kaj ekinteresiĝis pri la filozofio de Martinus. Tie ŝi malfeliĉe divorciĝis kaj kelkajn jarojn poste konatiĝis kun la franca skulptisto, Pierre Gaborit, kiu fariĝis ŝia dua edzo. Lis ĉiam lojale helpis lin per praktikaj laboroj. Post lia forpaso en 1999 Lis organizis kelkajn ekspoziciojn kun liaj skulptaĵoj kaj pentraĵoj.

Kirsten Zacho estis prezidanto de la konata Esperanto-klubo, KKK, Komuna Konversacia Klubo, poste Kleriga Konversacia Klubo, kiu poste kunfandiĝis kun la Studenta Esperanto Klubo (KKK/SEK). Lis Thune estis la libroservisto de la klubo dum multaj jaroj. Ŝi transportis la multegajn kaj pezegajn librojn al la klubejo kaj reportis ilin. En la Statuto de KKK estis paragrafo, kie estis notite, ke dum la klubkunvenoj la estraranoj havis la kroman taskon interparoli kun la novaj personoj, kiuj vizitas la klubon, por ke ili ne sentu sin izolitaj. Kvankam Lis ne estis estrarano, ŝi tamen tute nature kontaktis novajn vizaĝojn, por ke ili rapide sentu sin bonvenaj en la klubo.

Dum multaj jaroj Lis instruis la Internacian Lingvon al pluraj klasoj de sia lernejo, Risbjergskolen (Hvidovre). En someraj ferioj ŝi ofte kun la gelernantoj partoprenis esperantistajn aranĝojn, ekzemple en la Internacia Popola Altlernejo en Helsingør, en Finnlando kaj en Grésillon, Francio, kun la celo, ke ili spertu la specialan Esperanto-etoson.

Lis Thune estis kunfondinto de Dana Ligo de Esperantistaj Instruistoj en 1963, kaj tri jarojn poste ŝi fariĝis ĝia prezidanto. Dum multaj jaroj ŝi kunlaboris kun Mogens Rude Andersen (kiu ĵus aranĝis brilan Esperanto-ekspozicion pri la dana Esperanto-Movado okaze de la Jubileo de DEA, kaj Lis donis al li bonajn konsilojn pri la komponado de la ampleksa materialo, kion, cetere, ŝi lernis de sia edzo) kaj Mogens Groth, i.a. en la Dana Esperanto-Ekzamena Komisiono, ĝis sia forpaso. Dum certa periodo ĝis siaj lastaj tagoj ŝi estis estrarano de la Esperanto-Kulturgrupo, kies prezidanto estas Torben Svendsen.

Ĉiam Lis Thune estis senfine helpema! Neniu iam spertis, ke ŝi neis veturi longajn aŭ mallongajn distancojn per sia aŭto por transporti aŭ homojn aŭ objektojn. Ĉiam kun rideto ŝi estis preta helpi, ĉiam pozitiva.

Ekde 1981 ĝis 1987 Lis Thune multe helpis per praktikaj laboroj rilate al la revuo “Horizonto”. Ŝia edzo, Pierre Gaborit, estis ĝia arta konsilisto. Ili estis centprocente lojalaj al la idearo de Ivo Lapenna, mia edzo, kio estis, kompreneble, ankaŭ la idearo de L.L. Zamenhof. Ambaŭ partoprenis la Konferencojn de la Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (prezidanto: Ivo Lapenna), kiu estis daŭrigo de la Zamenhofa linio.

Rilate al la “Fondaĵo Ivo Lapenna”, kiu estas fondita de Peter Zacho kaj d-ro Paul Neergaard en 1984, Lis ĉiam estis preta helpi per praktikaj laboroj - foje eĉ finance kontribuis. Kiam Bruno Masala kaj mi aranĝadis la hejmpaĝon de la Fondaĵo, Lis Thune, Torben Svendsen kaj Aleksander Kogan multege helpis nin. Poste Steen Vester kaj mi

rearanĝis la paĝon.

Ĝis sia forpaso Lis Thune helpis multajn personojn, i.a. sian bonegan amikon, Mogens Groth, kiu edukis multajn esperantistojn, kaj kiun ŝi tre ŝatis. Preskaŭ ĉiutage ŝi estis en lia hejmo. Ŝi havis plurajn kontaktojn kun geamikoj en la Esperanto-Movado. Post ŝia forpaso alvenis diversaj retmesaĝoj, i.a. de la irandevena kuracisto, Shahram Rahimi-Saber, kiu estas dana civitano, sed laboras en usona universitata hospitalo, kaj kiu estas bone konata kaj tre ŝatata de multaj danaj esperantistoj. Li skribis: “Kara Birthe, Mi jam ricevis la malĝojan mesaĝon. Lis estis treege valora homo kaj estas granda perdo por la Esperanto-Movado. Ni ĉiuj kondolencas ŝiajn familianojn. Ŝi estis tiel granda kaj aminda persono. Via memoro ĉiam estas en niaj koroj, kara Lis. Dankon, Shahram, Sonek kaj la infanoj.”

Mi mem tute samopinias kun Shahram. Lis mankas kaj mankos al ni ĉiuj. Koran dankon Lis pro via fidela amikeco kaj ĉiama helpemo dum multaj, multaj jaroj! ...

Birthe Lapenna

Gazeteltondaĵoj

Februaro 2008

Jernbanefritid: Nye tider i Esperantosektionen

Universitetsavisen: Sprogpolitik i sprogåret

Hjemmet: Krucvortenigmo kun mencio de la vorto Esperanto

Stofmagasinet: LERNU. Lær verdenssproget Esperanto

Prelego de Birthe Trærup pri Smetana menciita en Berlingske Tidende kaj duloke en Næstved-medioj.

Marto 2008

Jernbanefritid: Esperanto ved jernbanen i Danmark

ATS Politiken: Anders Fogh prezidanto por Den Europæiske Esperanto-Union

TDC Online: Dagens tip – Lær nye sprog til ferien

Aprilo 2008

Krucvortenigmo en Familie-Journalen kun mencio de Esperanto

Jernbanefritid: Første aktiviteter i 'Ny DEFA'

Radioprogramo de Radio Vatikano pri Esperanto-elsendoj

Dansk Vandrelaugs medlemsblad: Vandring og esperanto

Information: Litteratur er kongevejen til virkeligheden (Esperanto-PEN-centro)

Jyllands-Posten: 197 kandidater til Nobels Fredspris, bl.a. esperanto

Jyllands-Posten: Kunstsproget esperanto fylder 100 år

Arbejderen: Esperanto 100 år i Danmark

Majo 2008

Dagbladet, Ringsted: Lær esperanto

Lokalbladet Ringsted: Esperanto-undervisning

Jernbanefritid: DEFA-nyt – ud af huset

Junio 2008

Politiken: Japan frygter esperantister vil angribe G8

Hjemmet: Krucvortenigmo kun mencio de Esperanto kaj Ido

Sprog og Samfund: Mencio pri kunlaboro inter Modersmålselskabet kaj DEA + artikoleto pri la 100-jariĝo de DEA

Julio 2008

Information: Mencio pri KEFeto

Berlingske Tidende: Mencio pri KEFeto + granda artikolo pri Jacob

Nordfalk kaj KEFeto

Jernbanefritid: Om Zamenhof-tog i Polen

Krome ni vidis en libro de Anne Holt: 1222 (Gyldendal 2008) dufoja mencio de Esperanto

Daŭre memoru sendi ĉiajn menciojn pri Esperanto al Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved. (Ĉu vere nur Information kaj Berlingske Tidende menciis KEFeton?)

Danaj Esperantaj retpaĝoj

Lars Kromann el Fakse starigas plurajn hejmpaĝojn, precipe pri dana literaturo esperantigita. Du sekcioj estas jam pretaj, nome www.chifonoj.dk pri la fabeloj kaj aliaj verkoj de H.C.Andersen (en kunlaboro kun multaj personoj), kaj www.poulthorsen.dk pri la verkoj de Poul Thorsen.

Nun prilaborataj estas www.heredodana.dk pri danaj verkoj, tradukitaj al Esperanto, kaj www.esperantonia.dk pri ĉiaspecaj danaj esperantaĵoj, ekzemple organizado, poezio, rakontoj, paroladoj, - jes, fakte ĝi enhavas ĉiaspecaĵojn el nia grava lando!

Vi povas vidi, ĉu estas novaĵoj en la paĝoj post via lasta vizito, nome sur la paĝoj www.heredodana.dk/nova.htm kaj www.esperantonia.dk/novajpagoj.htm.

Se vi opinias, ke io mankas – sciigu tion al Lars – eventuale sendu la verkojn al li. Li ankaŭ petas informi lin, se oni trovos erarojn en la paĝoj (retadreso: larsev@get2net.dk). Li cetere faris la teknikajn laborojn por jenaj retpaĝoj: www.bonvenon.dk ; www.esperanto-brevskole.dk ; www.jernbaneesperanto.dk; www.defa-historio.dk.

Progreso de muzeo

El Vieno oni raportas ke la aŭstraj aŭtoritatoj decidis pliiĝi la malferman tempon de la Esperanto-Muzeo, ĉar la Esperantlingvaj paĝoj de la Federacia Ministerio pri Ekonomio kaj Laboro (BMW A) estis bone vizitataj. Rezulte kreskis la nombro de muzeaj vizitantoj je proksimume 120%!

Ekspozicio

La DEA-jarkunveno 2008 estis samtempe la centjara jubileo de organizita movado en Danio. En 1908 fondiĝis CDEL, kiu nun nomiĝas DEA. La jubilea aranĝo okazis 18.-20. de aprilo en la Kultutrdomo Bispebjerg Nordvest, Dortheavej 61, Kopenhago.

Unu el la eroj de la aranĝo estis ekspozicio pri la cent jaroj. En granda salono troviĝis (ne nur semajnfine dum la jubileo, sed dum tuta semajno) impone granda, varia kaj informriĉa 'montrofenestro' pri la historio de la dana Esperanto-movado. Tekstoj, bildoj, libroj – sur tabuloj, tabloj kaj en montrorankoj; pri homoj, lokoj, kluboj kaj eventoj.

Dum multaj monatoj la kreinto de la ekspozicio, Mogens Rude Andersen, profundiĝis en la materio kun la obstina kaj pacienca energio, je kiu ni konas lin, kaj li sukcesis kolekti nekredible multajn objektojn kaj kunigi ilin en bona kaj kelkfoje surpriza maniero. La prezento estis digna kaj agrabla, kaj mi bone komprenas, ke ĉiuj partoprenintoj en la Jarkunveno kun ĝojo vizitis la 3-an etaĝon.

De plej diversaj arkivoj kaj homoj Mogens akiris kontribuajojn. Ankaŭ li kontaktis diversajn homojn, kiuj tute ne esperantas, sed kies avo/avino/onklo estis inter la pioniroj. Cetere li kompreneble uzis sian propran grandan scion pri la dana esperanto-movado.

La rezulto estis mirinda – kaj kiel mi skribis kelkfoje surpriza: 'aliaj aliroj' al konataj temoj, nepublikigitaj fotoj, ĝis nun ne uzitaj tekstoj.

Mi legis gastlibran komenton: bela, impona, admirinda – grava, valora, eksterordinara estas vortoj, kiuj reaperas. Gratulon kaj dankon al DEA, kiu iniciatis, kaj al Mogens, kiu laboregis, por ke ni ĝuu, kleriĝu, lernu ...

Mi esperas, ke poste en aliaj lokoj troviĝos la ampleksa montrofenestro pri unuaj cent jaroj de la dana Esperanto-movado.

Lene Niemann

Loke

Næstved

Sekretario: Grete Nielsen, Bogensevej 37, 1-185, 4700 Næstved, tel 55 72 12 40, rete atingebla pere de: eho-esperanto@stofanet.dk - Kunvenoj okazas en Grønnegade 10B, konstruaĵo 10, ĉambro 111, ordinare je h 19.30.

Okazos

Ve 19.09: Kunveno kun trakto de ĉapitro 23 de *Faktoj kaj Fantazioj*

Ve 03.10: Danlingva prelego: Lene kaj Jan U. Niemann rakontos pri vojaĝo al Laoso. Komuna manĝado je h 18.00 por dezirantoj je po 40 kr. Aliĝo al tio plej malfrue 30.09.

Ve 10.10: Kunveno kun ĉapitro 24 de *F+F*.

Ve 17.10 je h 19.00: DEFA-kunveno. Ĉiuj estas bonvenaj.

Ve 31.10 je h **14.00**: Kunveno kun ĉapitro 25 de *F+F*.

Ve 14.11 je h 19.00: DEFA-kunvenmo. Ĉiuj estas bonvenaj.

Ve 21.11: Danlingva prelego: Ileana Schrøder prelegos i.a. pri la praga manifesto. Komuna manĝado je h 18.00 kiel 03.10. Aliĝo plej malfrue 18.11.

Ve 05.12 je h **14.00**: Kunveno kun ĉapitro 26 de *F+F*.

Ve 12.12 je h 13.00: Kristnaska lunĉo. Aliĝo necesa.

Okazis

Kiel planite okazis somera ekskurso al Køge sabate la 7an de junio.

Nemultaj partoprenis, sed sufiĉe multaj por krei agrablan kaj ujutnan etoson. La *mini-urbo*, komuna lunĉo ĉe Astrid kaj Erik kaj promenado en proksima parko kun tre interesaj arboj kaj imponaj rododendroj.

Kopenhago

Programo de KEK

Kunvenoj okazas ĉiulunde ekde la 19.30 en la dua etaĝode Dorthea-vej 61: se ĉi-sube ne estas indikita programo, kunvenas nur studgrupo.

11/08 Raportado pri la someraj kongresoj.

18/08 Rakontu pri libro legita.

25/08 7 partopenintoj prelegos pri la DEFA kongreso en Polando.

Dimanĉe 30/08: Tago de integriĝo en la Kopenhaga Komunumo.

Funkcios Esperantobudo ĉe Dronning Louises Bro inter 12-18a horo.

01/09 Introduktion til esperanto. Danlingva enkonduko al la Esperanto-historio precipe por komencantoj, malferma al la publiko, prepara al la Lingvofestivalo la 21-an de septembro.

08/09 Teatraĵo de Jerzy Fornal el Polando

Dimanĉe 21/09: Lingvo-festivalo (vidu la dorspaĝon!).

29/09 Kurskomenco por komencantoj. Aŭtuna aŭkcio.

13/10 Prelego de Egon Starup: ‘35 jarojn serve al la medicino’

En la prelego estas malagrablaj, sangaj eroj. Mi ilin avertas tiel, ke oni povos eliri 10 minutojn, dume mi tiujn erojn priparolos.

Por la kuraĝaj mi disdonos senpagan ‘snaps’ (se restos iom, ankaŭ la malkuraĝaj povos ĝui la alkoholon). Mi garantias, ke ĉiuj komprenos ankaŭ la matematikon gimnazi-nivelan, kiu estas necesa por tute kompreni la mian invenon en la laboratorio antaŭ 40 jaroj. Invento kiun oni ankoraŭ aplikas en la fabriko!

20/10 Muzikvespero – kunportu vian kodoon.

03/11 Stanislaw Mielczarek prelegos pri romaoj (ciganoj).

10/11 Venontjara UK kaj Revua vespero.

17/11 Astrid kaj Erik rakontas pri Bona Espero.

- 01/12 Eliza Kehlet prelegos pri sia vivo.
08/12 Numerludo.
15/12 Kristnaska festo kaj librotago

Stafeto KEF-eto

”Ĉu esti aŭ ne esti?” – tio estis la titolo de la flugfolio de Kultura Esperanto-Festivalo, planita por la 12-a de julio. Post longa cerbumado la organizantoj mem respondis nee al la demando, kaj pro pluraj kialoj, ĉefe manko de subvencioj, nuligis la festivalon, kiu okazus en Helsingør.

Anstataŭe okazis pli modesta, sed sukcesa ”KEFeto Stafeto” dum unu tago en Kopenhaga kulturdomo. La tempo sufiĉis por prelego de Flo, metiejo, “homa futbalo” kaj koncertoj de Initials DC, Espo Despo, La Perdita Generacio kaj Esperanto de Luxe.

Novaj libroj

Roman Dobryński: Bona Espero : idealo kaj realo. Por ĝia 50-jara jubileo, finfine libro pri la fama Esperantista infanejo en la brazila ĝangalo! Per aĉeto de ĉi tiu fascina 256-paĝa kolora libro, vi subtenos socian agadon favore al infanoj en la Tria Mondo! (Prezentita dum la UK en Roterdamo – prezo ankoraŭ ne konata).

Ulrich Lins: Utila Estas Aliĝo : tra la unua jarcento de UEA. 126-paĝa superrigardo pri la ĉefaj trajtoj de la agado de UEA dum cent jaroj, kaj mallongaj biografioj de ĝiaj du plej gravaj prezidantoj: Hector Hodler, la fondinto, kaj Ivo Lapenna, la konstruinto de la moderna UEA. 15.00 € ĉe la libroservo de UEA.

SPROGFESTIVAL

2008

21. september kl. 11-19 · Kulturhuset Dortheavej 61



Sprog er nøglen til interkulturel dialog.

En fest for sproglig mangfoldighed og international kommunikation. Oplev den globale smeltedigel – musik, mad, dans, ordbrokker og sprog på mange måder ...

The Middle East Peace Orchestra

www.sprogfestival.dk er arrangeret af:



Esperantoforeningen for Danmark
Dana Esperanto-Asocio / DEA

i samarbejde med:

 Modersmål-Sekketet

 Bispebjerg Lokaludvalg

bispebjerg nordvest
KULTURHUSET

VI KBH'R